# *Letero de Obama estos transdonita al la prezidento Raúl Castro.*



La interna ministro pri eksteraj rilatoj de Kubo, Marcelino Medina, akceptos hodia? la sekciestron de interesoj de Usono en Havano, Jeffrey DeLaurentis, kiu portas leteron de la prezidento Barack Obama al la prezidento Raúl Castro pri la restarigo de la rilatoj kaj la malfermo de ambasadejoj en la respektivaj landoj.

Pri la temo, internaciaj informagentejoj sciigas ke hodia? Usono anoncos la malfermon de sia ambasadejo en Havano kaj same Kubo pri sia diplomatia sidejo en Washington.

La informagentejo Reuters asertas el kelkaj fontoj, ke la prezidento Barack Obama kaj la ?tata sekretario John Kerry,- kiu nun estas en Vieno – diskonigos la novan pa?on por la restarigo de la diplomatiaj rilatoj kun la insulo, interrompitaj de anta? pli ol 50 jaroj.

Inter la donitaj pa?oj de Usono kaj Kubo tiurilate menciindas la forigo de la insulo el la listo de landoj subtenantaj terorismon, kio efektivi?is komence de junio.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/60977-letero-de-obama-estos-transdonita-al-la-prezidento-raul-castro

**Radio Habana Cuba**